# Informilo

2 3 DEC. 1981

SANON

新年おめでとうございます。

God jul og godt nyttår

Feliz Año Nuevo

PROSPERON

Season's Greetings

Ein glückliches Neues Jahr

שנה טובה

Gelukkig Nieuwjaar

Ein glückliches Neues Jahr

Meilleurs vœux pour la nouvelle année

Gott Nytt År

Sretna Nova Godina

Felice anno nuovo

Gelukkig Nieuwjaar

Sali now mobarak

Boas Festas e feliz Ano Novo

Hyvää Uutta Vuotta

Ein glückliches Neues Jahr

Meilleurs vœux pour la nouvelle année



AL ĈIUJ VI KAJ LA VIAJ

Boldog ... ...ndöt

Ein g... ...liches Neues Jahr

...œux pour la nouvelle année

...n's Greetings

Season's Grootings

ĜOJAN JARFINON

Me...

FELIĈAN KAJ PROSPERAN NOVJARON

التمنيات

Meilleurs vœux pour la nouvelle ...

Bedste önsker for det nye år

Dosiego Roku

Felice anno nuovo

FELIĈON

SUKCESON.


Monata revuo de F L A N D R A E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto
Jaargang N° 1 dec. 1981

Verantwoordelijke
Respondecas Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL


---

I N F O R M I L O

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare

"INFORMILO" estas kontaktilo/ diskutilo inter la estraro kaj la membraro de FEL. Ĉiu povas partopreni en ĝi per personaj kontribuaĵoj. Tiuj ĉi kompreneble restu sub la respondeco de la kontribuantoj.

Tekstoj atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la monato.

================================

F E L - Ŝ P A R K O N T O

FIKSDATAJ MONDEPONOJ

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-7069801-50
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

================================

LIBRO-SERVO S O N O R I L O

Doornstraat 22
2610 WILRIJK

Direktoro : Monique VEREECKEN

Telefono : 031/27 24 05

Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN

Telefono : 031/16 05 05

Direktoro : Paul PEERAERTS

====================================

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

René BUDTS, Pr. Rooseveltlaan 168/9
9000 GENT
091/ 23 53 48
respondeculo por Orient Flandrujo

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



L.S.,

Vi povis legi en la antaŭa numero de INFORMILO, ke ĉiu kiu jam ion verkis aŭ tradukis en Esperanto, povas ensendi tion al ESPERANTO-CENTRO cele al priekzamenado pere de la komisiono, kiu ĵus stariĝis, por ebla eldono. Temas kompreneble pri kompletaj verkoj.

Nu, ankaŭ ili, kiuj verkis nur mallongajn tekstojn, eseetojn, rakontojn ktp. povos ensendi sian laboron, cele al publikigo en ekzemple INFORMILO.

Tio ne signifas, ke kion ajn ni ricevos estos publikigota, kompreneble.
Tio ankaŭ ne signifas, ke ensenditaĵoj tuj aperos.
Vi komprenu, ke tio dependas de la valoro de la teksto kiel ankaŭ de la disponebla loko en INFORMILO.

Ĉio estos serioze priekzamenita.

Jam nun ni povas diri, ke ni rifuzos personajn atakojn, insultajn tekstojn, politikajn k.s. temojn.

Do, verkemuloj, "grimpu en vian plumon" kaj havigu al ni via(j)n teksto(j)n.

Dankon.

--------------------

## ĜENERALE

F E L atentigas pri tio, ke ESPERANTO-CENTRO en Antverpeno disponas, ne nur pri taŭga ekspozi-materialo, sed ankaŭ pri fakulo, kiu povas doni la necesajn konsilojn ktp.

Ne hezitu do peti informojn al la ESPERANTO-CENTRO, ekde 01 01 1982 en Frankrijklei, 140, 2000 ANTWERPEN, tel. 031/34 34 00.

------------

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - LEUVEN

La organizantoj de la venonta Internacia Junulara Kongreso en Leuven atentigas pri tio, ke la kotizoj (vidu la aliĝilon alie en la revuo) validas nur ĝis 15 01 1982. Poste estos aliaj prezoj, momente ankoraŭ ne konataj.

Atentu do bone por la alsendo de via aliĝilo.

La Kongres-komitato ankaŭ estas preta prizorgi programon en la lokaj grupoj, kompreneble rilate al la kongreso.

Kontaktiĝu kun ili pere de la sekretario de la komitato : Marc VAN DEN

BEMPT, Duisburgstraat 12, 3030 LEUVEN-Heverlee - tel 016/ 20 14 53.

Por grupoj proksimaj de LEUVEN, ili mem povos prizorgi la programon, por aliaj estas disponebla dia-serio kun teksto pri Leuven kaj la IJK.

Antaŭ longe estos preta bela afiŝo, havebla ĉe la sama adreso.

La loka komitato multe aprezus, se ĉiu inter ni volus reklami pri la IJK, por ke la belga delegacio estu kiel eble plej multnombra.

-------------

## F E L - K A D R O K U R S O J

La kurso-serio finiĝis per la dua studotago rilate al "kunven- kaj debat-teknikoj", gvidata de Paul Peeraerts.

La sekva paŝo estos kunvenigo de ĉiuj partoprenintoj al la kursoj kune kun la gvidintoj.

La celo ? Ebligi al ĉiu doni sian opinion, rimarkojn, sugestojn, fari demandojn respondotaj de la kursgvidintoj.

Ĝi okazos SABATON 30-AN DE JANUARO 1982 en ESPERANTO-DOMO, Frankrijklei 140, ANTVERPENO. (Bonvole atentu pri la dato, ĉar jam alia dato ie aperis. La 30-a de janurao, do, ĉar alie ni koincidus kun la solenaĵoj de LA VERDA STELO, kiu en 1982 ekzistos 75 jarojn.

Je tiu sama dato ankaŭ estos decidita pri la enhavo de la kajero kiun ni intencas eldoni, prepare al la "tago pri instruado" en la venonta Universala Kongreso.

Tiu ĉi dua kunveno estos dediĉita al interŝanĝo de spertoj kaj pri la necesoj estontaj.

Tiu ĉi kunsido estos publika, do alirebla ankaŭ al ne-partoprenintoj de la kursoj.

Pliaj detaloj sekvos.

---------

## E L D O N E J O "S O N O R I L O"

Ne forgesu, ke SONORILO estos alirebla dum la jarfinaj festotagoj je 22 kaj 23 12 1981 de 10.00 ĝ. 12.15 h. kaj de 14.15 ĝ. 18.00 h.

Telefonalvokoj prefere inter 16.00 kaj 17.00 h.

Mendoj por pli ol 1.000 BF rajtigas donacon.

-----------



# K I O E S T I S . . .

## A N T W E R P E N

LA VERDA STELO

Je vendredo 13 11 1981 LA VERDA STELO bonvenigis S-ron ILOW el Aŭstralio. Fakte Polo elmigrinta al Aŭstralio kaj ĝuante sian libertempon farante mondvojaĝon.

S-ro ILOW prezentis belegan serion da lumbildoj pri Aŭstralio kaj ege interesan paroladon pri la lando. Post sia parolado, li afable respondis al ĉiuj specaj demandoj el la publiko.

La vesperon ĉeestis tiom da personoj, ke mankis sufiĉe da seĝoj pro sidigi ĉiujn interesitojn.

Je 27 11 1981 LA VERDAn STELOn vizitis S-ro Gregoir MAERTENS, UEA-prezidanto. Li prelegis pri sia restado en Brazilio okaze de la pasinta Universala Kongreso.

Antaŭ ol prezenti serion de ege belaj diapozitivoj, ne nur pri la lando kaj ĉefurbo, sed ankaŭ pri BONA ESPERO, la Esperanto-insuleto meze en la arbarego, S-ro Maertens rakontis pri la landa kaj la ekesto de la ĉefurbo Brazilia. Ni nun scias, ke fakte la urbo naskiĝis el sonĝo de St. Don Bosco en la jaro 1881...

Rilate al BONA ESPERO, ni jam ofte aŭdis kaj legis pri la gekuraĝuloj, la familio GRATTAPPAGLIA kaj pri ties bonega laboro : alporti iom da belo kaj bono al la arbareg-loĝantoj kaj instruadon al iliaj infanoj.

Tamen ilia laboro kaj sukceso parte dependas de iliaj materiaj havaĵoj kaj nutr-eblecoj.

Jen taŭga loko, ŝajnas al ni, por memorigi al vi, ke uzitaj sed ankoraŭ bonaj vestaĵoj estas tre bonvenaj al niaj geamikoj tie fore. Por faciligi la kunmeton de pakaĵoj kaj ilia forsendo, ESPERANTO-CENTRO en Antverpeno akceptas viajn donacojn kaj zorgos por la plusendado al Brazilio.

Internacia vespero okazis denove je 11 12 1981.

Paroladis S-ro GHADIMI, en Lieĝo loĝanta Iranano, pri Lidja Zamenhof kaj la Bahaaismo.

La temo tiom interesis al la ĉeestantoj, ka la programo daŭris ĝis malfrue en la vespero.

S t . N I K L A A S

Je 30 11 1981 la klubo akceptis s-ron Petro De Smedt, kiu prelegis pri la Universala Kongreso en Brazilio.

De 26 11 ĝis 05 12 1981 okazis libro-borso en la Aĉetcentro de St. Niklaas en kiu ankaŭ estis Esperanto-stando.

---

M O R T S E L

Dank'al unu el siaj membroj (S-ro E. De Baets, prezidanto de la AGVA-GEVAERT Filmo-klubo) la membroj de ESPERANTO MORTSEL havis okazon senpage ĉeesti filmprezentadon de la Flandra/Nederlanda filmo DE WITTE.

. . . E S T A S . . .

A N T W E R P E N

S-ro ILOW, la Aŭstraliano kiu paroladis je 13 11 en LA VERDA STELO, foroferas parton de sia libertempo laborante en la ESPERANTO-DOMO por ĝin prepari al la uzado al kiu ĝi estas destinita : la loĝado de ESPERANTO-CENTRO kaj de la GRAFIKA CENTRO DE UEA, ekde januaro 1982.

Jen bela ekzemplo de solidareco, rilate al kiu ni ŝuldas sinceran dankon al S-ro ILOW.

---

M O R T S E L

La kurso, kiu okazas ĉiun dimanĉon matenon, atingis la "mezon" . . La kursanoj sin preparas jam al taŭga festado de la lasta kursotago, kiun ili atendas ĉirkaŭ mez-februaro.

Ili "organizis" ŝparpoton por kovri la kostojn.

. . . E S T O S .

A N T W E R P E N

En januaro 1982 okazos en Antverpeno serio da solenaĵoj organizotaj de LA VERDA STELO por festi la 75-jaran datrevenon de sia klubo.



Diversaj tre interesaj solenaĵoj okazos !

Por pli da detaloj ni referencas al ESPERANTO PANORAMA.

L E U V E N

Je dimanĉo 21-a de februaro 1982 ESPERANTO 2000 malfermos, per solena ceremonio, la SEMAJNOn DE INTERNACIA AMIKECO. Samtempe okazos ekspozicio pri Esperanto, tiu ĉi lasta por ne-esperantistoj, kompreneble.

Ĉiu estos bonvena, sed por doni al la evento pli da internacieco, ESPERANTO 2000 insiste petas sciigi al ili la adreson de eksterlandaj membroj de la diversaj grupoj.

Do, Karaj Grupestroj, faru al ili la komplezon kaj sendu al ili tiujn adresojn. Ili ŝuldus al vi multan dankon pro la kunlaboro.

Viajn informojn sendu al ESPERANTO 2000, Duisburgstraat 12, 3030 LEUVEN.

Ilianome : koran dankon !

S t . N I K L A A S

Je 08 01 1982 ekde 20.00 h. komenciĝos nova kurso por komencantoj. Prizorgos la kurson, kiel ankaŭ la enkonduka informvespero, S-ro Rene LUTZ.

---

Vi konstatas, ke ni raportos pri nur kelkaj grupoj.

Se vi nenion legas pri via propra grupo, tio signifas, ke tiurilate ni ricevis nenian informon.

Do, se vi ŝatus legi ion ankaŭ pri via grupo, instigu viajn estraranojn komuniki la lokajn novaĵojn. Tio ja ne estas tiel granda peno !

Cetere, la komunikojn ne nepre estu skribaj. Ni ankaŭ akceptas buŝajn, telefonajn informojn. Telefoni vi povas, dum la laborhoroj je 02/513 80 90 aparato 249, vespere ekde la 19-a horo je 031/49 50 06.

Nur pere de K U N - l a b o r o ni sukcesos prezenti al vi revuon interesan por ĉiuj.

Aliflanke, ĉiu kiu havas ion por diri, povas ensendi sian tekston al la redaktoro. Tion vi cetere jam legis aliloke en ĉi numero.

Eĉ por grumbli aŭ reprimandi la estraron, vi tie estos ĉe la ĝusta adreso.

---

## ASOCIO POR ESPERANTO ALVOKAS ...

Por atesti pri la homaj suferoj kaj la gravaj detruoj pro la du unuaj atombomboj jam surtere lanĉitaj (200.000 tujaj mortintoj, amasoj da ruinoj, blinda brulofero), la japanaj esperantistoj, la restantaj viktimoj, vunditaj kaj kripligitaj,celas nun sciigi pri tiuj eventoj al la plej mulnombraj homoj el la tuta mondo. Ili bezonas nian helpon !

Ĉu tio oni aùdacus rifuzi ?

Ni opinias ke N E !

Pro tio ni pozitive respondis al ilia alvoko.

Nun japanaj viktimoj kaj samideanoj anoncas al ni la alvenon, komence de februaro, de multnombraj bildegaj atestiloj !

Ekspozici-panelojn ni havos : 56 je 95 X 50 cm
75 je 55 X 45 cm
19 je 60 X 50 cm

Dum proksimaj februaro kaj marto, nia devo estos plej larĝskale vidigadi tiun gravan materialon !

Tial ni atendas rapidajn proponojn de ĉ i u a j n , koncerne lokojn, salonojn kaj datojn por ekspozicii.

Kion povas fari V I ?

Tion ni baldaŭ volus sciigi al niaj japanaj amikoj, laŭ viaj iniciatoj.

Jam de nun, sendu viajn proponojn, por ordigi elmontro-kalendaron,al la skeretario de ASOCIO POR ESPERANTO, S-ro Clément THOLET, 54 rue des Hineux 4400 HERSTAL, Tel 041/64 02 71.

Anticipe tutkoran dankon.

Subskribis : L. DREZE (prezidanto) kaj C. THOLET (sekretario)

F E L volonte kunlaboras en la afero, sed ĉar la ekspoziciado estas grupa afero, alvokas al ĉiuj grupoj kun bon-volo prikonsideri la alvokon kaj kontaktiĝi kun la respondeculoj por aranĝi la organizadon.

Dankon.



## PROTOKOLO

23 DEC. 1981

Estrarkunsido de sabato 11 12 1981 en Antverpeno.

Ĉeestas : Edward SYMOENS, Roger DE SCHEPPER, Paul PEERAERTS, Gerd JACQUES
Guido SCHROEYERS kaj Jan BOVENDEERD
Petis senkulpigon : Jules VERSTRAETEN kaj Fernand ROOSE.
Kiki TYTGAT (eksterlande.)

Prezidas : E. Symoens
Protokolas : J. Bovendeerd.

### TAGORDO

1. La protokoloj pri la estrarkunsidoj de 31 10 kaj 14 11 1981 estas aprobitaj.

2. RAPORTADO DE LA ESTRARANOJ :

2.1. Administrado (JB kaj PP) nenio speciala.

2.2.1. Edukado (JB)
La unua serio de kadrokursoj finiĝis.

2.2.2. La intenco nun estas kunvenigi ĉiujn kursanojn kaj kurs-gvidintojn

2.2.2.1. - unuan fojon je sabato 30 01 1982 (kaj do ne je 23 01 1982 kiel jam foje indikita) por ekzameni inter si la valoron de la serio mem kaj por interŝanĝi demandojn, respondojn, rimarkojn, sugestojn...

2.2.2.2. - duan fojon je 22 05 1982 por interŝanĝi spertojn kaj prepari la estonton, samkiel por prepari la raporton farotan por la UEA-komisiono pri Edukado.

2.3. Financoj :

2.3.1.1. La subvencidosiero rilate al la buĝeto jus alvenis.

RDS/JB 2.3.1.2. RDS sin okupos pri la preparo de la buĝeto, dum JB redaktos la "moralan raporton"

JB 2.3.1.3. JB ankaŭ informos pri la asekura premio.

2.3.1.4. Pri ambaŭ decidos la estraro en sia kunsido de 09 01 1982 por permesi ensendon de la dosiero antaŭ 15 01 1982.

2.3.2.1.1. Laŭ PP la financa situacio ne pli malboniĝis.

2.3.2.1.2. La prezidanto sin demandas ĉu ekzistas ŝpareblecoj.

2.3.2.1.3. Laŭ PP ne, krom se oni decidus fari paŝon malantaŭen kaj reveni en la situacion el kiu ni venas.

2.3.2.1.4. Sed ekzistas enspez-eblecoj, ekzemple pere de eldonaĵoj.

2.3.2.2.1. La kotizsistemo pere de la oranĝaj aliĝiloj, ŝajne tre bone funkcias. Personoj kiuj antaŭe kontraŭstaris la sistemon, nun

ŝajnas ŝati ĝin.

En la nuna momento envenis jam pli da kotizoj ol pasintjare je la sama momento.

2.3.2.2.2. La donacan kotizon pagis jam 37 personoj, subtenantoj de FEL estas 1 (unu), subtenantoj de FLEJA ± 20.

-Individuaj membroj de UEA - do kun jarlibro - ĝis nun estas 58

-Abonantoj de ESPERANTO de UEA : 69

2.3.2.2.3. Ĝis nun pagis sian kotizon 193 personoj,

| | |
|---|---|
| el LA VERDA STELO | 45 |
| MORTSEL | 19 |
| LA ERIKEJO | 12 |
| MECHELEN | 1 |
| TURNHOUT | 2 |
| LIMBURGO | 1 |
| PACO KAJ JUSTECO | 12 |
| BRUĜA JUNULARO | 6 |
| BLANKENBERGE | 6 |
| KORTRIJK | 23 |
| GENTA KLUBO | 2 |
| LA PROGRESO | 3 |
| St. NIKLAAS | 8 |
| AALST | 1 |

2.4. Iformado, Planado, Agado (ES)

2.4.1.1. En Oostende okazis kunsido ĉe Ges-roj D'HULSTER. Partoprenis 12-o da personoj, ĉefe el la instruista medio. Trafante estis; ke la starigitaj demandoj ĉiam estas la samaj. Ĉiu ricevis diversajn informdokumentojn.

2.4.1.2. La fina celo estas starigi lokan grupon. La kerno jam ekzistas en la persono de S-ro D'Hulster.

2.4.2.1. La ĝeneralan UEA-seminarion en Berlino ĉeestis duone/duone Orient- kaj Okcident-Eŭropanoj.

2.4.2.2. La laborplano de UEA estas ellabori detalan, konkretan labordokumenton.

ES 2.4.2.3. ES atendas la raportojn por pli detale informi.

2.4.3.1. La Landaj Asocioj organizu similajn diskut-tagojn, eĉ por ne-esperantistoj.

2.4.3.2. La problemo estas ke Esperantistoj ne sufiĉe konsciiĝas pri la evoluo de la socio.

2.4.3.3. Laŭ JB UEA devus unue <u>instrui</u> la Landajn Asociojn, iasence dikti al ili la vojon irotan. En tiu rilato li opinias, ke ne sufiĉas organizi ekzameneblecojn pri lingvokono, sed ĉefe "instru-" aŭ



"eduk"- programon por la LA.

2.5. Provinca agado : Limburgo (GS)

En Hasselt okazis ekspozicio, kiun vizitis multe da homoj, sed kiu restis ĝis nun sen pozitiva sekvo.

2.6. FLEJA (GJ)

2.6.1. La Nederlanda junularo decidis kunlabori en ka festado de la 50-jara datreveno de la ekzisto de la Junulargastejo-organizo. Disdoniĝos taŭgaj Esperanto-informilojn.

2.6.2.1. AFS (American Field Service), asocio kiu okupiĝas pri la interŝanĝaj loĝadeblecoj inter gastfamilioj, spertas malfacilaĵojn pro lingvaj kialoj, precipe en Orient-Eŭropo. Tial ĝi alvokas al Esperanto-organizoj.

2.6.2.2. En tiu rilato, Belgio ricevis kiel laborkampon HUNGARION. La unuaj kontaktoj jam okazis. Estas atendataj nun la reagoj.

3. <u>Kontrakto Inst. HODLER/ FEL rilate al la ESPERANTO-DOMO.</u>

3.1. La de I.H. prilaborita lu-kontrakto, subskribota de la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario de FEL, estas principe akceptita, sed antaŭ ol subskribi, la estraro preferas atendi la kontrakton UEA/FEL/GCA.

3.2. La sekretario tiel respondos al I.H.

4. <u>Eldon-/Traduk-komisiono</u>

4.1. JB raportas, ke S-ro Chris DE CLERCK akceptis respondecon pri tiu komisiono kaj ke li pretas kunmeti la komisonon mem.

PP 4.2.1. PP lanĉos tradukkonkurson pere de ESPERANTO PANORAMA por trovi valorajn elementojn.

PP 4.2.2. Li ankaŭ esploras la eblecojn de premiado.

4.3. Verkoj : PP jam ricevis unu verkon, kiun li do transdonos al CD por pri-juĝo.

5. <u>Regular-revizio.</u>

5.1. Decidiĝas prokrasti tiun ĉi punkton ĝis post la UK

5.2. La sekretario tamen sendos al la grupoj - pere de INFORMILO - formularon plenigotan cele al preparo de la venonta jarkunsido.

6. APE (Asocio por Esperanto) petis kunlaboron rilate al ekspozicio pri la japanaj Atomviktimoj. Ĉar FEL mem fakte nenion povas fari, krom alvoki al siaj grupoj al kunlaboro, la sekretario faros tiun alvokon pere de INFORMILO.

7. <u>Kunsidoj</u> kernestrar-, plenestrar-, administrantar- ..

7.1. Post diskuto decidiĝas estonte kunvenigi la kernestraro ĉiu-monate, kaj la administrantaro, krom la ĝenerala jarkunsido, du kromajn fojojn en la jaro laŭ jena laborkalendaro :

7.2. estrar-kunsidoj : 09 01, 13.02, 17 04, 08 05, 11 09, 09 10, 11 12 1982
ĝenerala jarkunsido : 13 03 1982
administrantaraj kunsidoj : 12 06 kaj 13 11 1982

7.3. unua kunveno rilate al la kadro-kursoj : 30 01 1982
dua (ĝenerala) kunveno rilate al la kadrokrusoj : 22 05 1982

8. Diversaĵoj :

8.1.1. PP raportas ke LA PROGRESO sciigis al li, ke Genta revuo volas publikigi Esperanto-kurson.

PP 8.1.2. Sekve al la konsilpeto de LA PROGRESO, PP sendos nian korespondan kurson, kiu tre bone taŭgas por tio.

GS 8.2. Ankaŭ GS konsilos tiun saman kurson al la Limburga Eldonisto kiu volas publikigi E°-kurson.

8.3. En LA PROGRESO la sekretario abdikis. Lin anstataŭos S-ino Lödör.

8.4. En la oranĝaj formularoj troviĝas eraro. La prezo de KONTAKTO ne estas BF 270 sed 285,-

8.5.1. Kelkaj grupoj demandis kion fari rilate al la membrokartoj : ĉu FEL sendos ilin aŭ ĉu tio restas tasko de la grupaj kasistoj ?

8.5.2. Prefere tio restu tasko de la grupaj kasistoj.

8.6.1. Kadre de niaj kadrokursoj, ni petis al RTT (Regie Telegraaf & Telefoon) ĉu eblos publikigi en ĉiu telefongvidilo de Flandrio :

ESPERANTOCENTRUM
Frankrijklei 140
2000 ANTWERPEN

8.6.2. RTT respondis ke ekde 1982 la telefongvidiloj aperos laŭ-komunume

8.6.3. Tio signifas ke nia anonco aperus pli ol 200 fojojn je niaj kostoj.

8.6.4. Tio kompreneble ne eblos ĉar estas nepagebla.

JB 8.6.5. Tial JB informiĝos pri la ebleco enmeti nian anoncon en la gvidilojn de la provincaj ĉefurboj (Bruĝo, Bruselo, Gento, Hasselt) dum en tiu de Antverpeno ĝi aperos senpage.

F i n o 15 . 15 h.

JB.

------------------------

Bijvoegsel bij het maandblad "INFORMILO" dec. 1981

# ALIĜILO ANTVERPENO

Kongresnumero
Dato de ricevo

Por la administracio

## 67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
## de la 24a ĝis la 31a de julio 1982 en Antverpeno, Belgujo

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 627337 (nederlanda), aŭ
Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444.

☐ Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. Mi sendas la pagon laŭ la apuda specifo al:

.............................................

per poŝtmandato/poŝta ĝiro/banka ĝiro /banka ĉeko*

☐ Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpagaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post alveno en la kongresejo.

| | |
|---|---|
| Kotizo (en kategorio ....) | ........................ |
| Adopta Kaso (Libervolaj donacoj) | ........................ |
| Blindula Kaso (Libervolaj donacoj) | ........................ |
| Literatura Kaso (Libervolaj donacoj) | ........................ |
| Adoptaj Gepatroj (Libervolaj donacoj) | ........................ |
| Bankkostoj | ........................ |
| Entute | ........................ |

Viro / Virino (forstreku la nevalidan)
Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeta ordigo) ..............................
Nomo (kompleta) ..............................
Kompleta poŝta adreso: nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita
..............................
..............................
Lando (en Esperanto) ..............................
Naskiĝdato (nur por studentoj, junuloj kaj infanoj) ..............................
Nomo de edz(in)o, kiu jam aliĝis aŭ aliĝas samtempe (aparta aliĝilo) ..............................
Dato de tiu ĉi aliĝilo ......../......../........ Subskribo ..............................
Por uzo de la administracio

UEA-membreco: kotizo de .. .......... ricevita por la jaro ..................
Konfirmo de la C.O.: Konfirmo de peranto:

| Pago ricevita | Konfirmilo sendita | Statistikita | 2a Bulteno sendita | Kongreslibro sendita |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

* Forstreku la nevalidajn. Pagante internacie per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 5 gld. pro la bankkostoj.


| Kongreskotizoj ĝis la fino de 1981: | En guldenoj | En bfr. | Aliĝu frue! Aliĝu ankoraŭ en 1981 por profiti la plej malaltan kotizarifon! Ekde la 1-a de januaro 1982 la kotizoj altiĝos minimume je 10% kaj ankoraŭfoje ekde aprilo. | Post la 12a de junio 1982 aliĝoj ne plu estos akceptataj, kaj la aliĝontoj devos pagi surloke en la kongresejo, laŭ la koncerna tarifo de la tria periodo plus krompago 40 gld. |
|---|---|---|---|---|
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA . . . . . . | 188 | 2750 | | |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro . . . . | 163 | 2400 | | |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo . | 125 | 1850 | | |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 . . . . . . . | 131 | 1950 | | |
| 5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3 . . . . . . | 114 | 1670 | | |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara . . | 56 | 830 | | |
| 7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara . . . . . . . . . | 94 | 1380 | | |
| 8. Blindulo . . . . . . . . | 75 | 1100 | | |

- **Aliĝantoj en Belgujo povas pagi la kotizon en bfr. rekte al la belga poŝtĉekkonto de la UK: 000-0457808-65 je la nomo de 67-e Wereldcongres van Esperanto, 2000 Antwerpen.**
- **La kongreskotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn aŭ bankedon.** Pri tiaj aferoj aperos informoj kaj mendiloj en la Dua Oficiala Bulteno, kiun aliĝintoj ricevos en februaro aŭ marto de la kongresa jaro. Frua aliĝo helpas la aliĝanton ĝustatempe fari siajn mendojn ĉe la Kongreso.
- **Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de la pago.** Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.
- **La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto poste ne partoprenas la Kongreson.** Pagante kongreskotizon por alia persono, oni tion antaŭvidu.
- **Kongresaliĝo ne estas transdonebla al alia persono.**
- **Estas nepre malavantaĝe kotizi en kategorio 1 aŭ 2.** Oni ricevas pli kontraŭ proksimume la sama pago se oni estas membro-abonanto de UEA.
- **Kongresano en kategorio 1** (nemembro de UEA) ricevas la revuon "Esperanto" dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.
- **Kongresano en kategorio 2 aŭ 3** devas pagi la membrokotizon de UEA antaŭ aŭ samtempe kun la kongreskotizo. Sen tio la aliĝilo ne estos traktita.
- **Kongresano en kategorio 6** devas indiki sian naskiĝdaton.
- **Kongresano en kategorio 7** devas indiki sian naskiĝdaton kaj sendi kun sia aliĝilo oficialan ateston pri sia studenteco.
- **Kongresano en kategorio 8** devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston pri blindeco de blindula organizajo aŭ kuracisto. Gvidanto de aliĝinta aŭ samtempe aliĝanta blindulo rajtas aliĝi senpage, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
- **Infano malpli ol 13-jara rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj, sed ne ricevas la Kongresan Libron.**
- **Ĉiu aliĝanto devas plenigi apartan aliĝilon.** Se oni ne havas aliĝilon, oni uzu fotokopion aŭ **samformatan paperon. Skribu klare – tajpe aŭ preslitere.**
- **Sendu la aliĝilon kaj faru la pagon al la sama instanco, prefere al via landa kongresa peranto.** Nur se en via lando mankas peranto, sendu la aliĝilon al la konstanta adreso en Rotterdam, pagante al unu el la kontoj indikitaj aliflanke.
- **Personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj povas sendi la aliĝilon, sen samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam. Tiuj personoj ne estos rigardataj kiel jam aliĝintaj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post la alveno en la kongresejo, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.**

– – – TRANĈU – – –

KONGRESA NUMERO

**38a INTERNACIA**
**JUNULARA KONGRESO**
**31 JUL — 07 AUG 1982**
**LEUVEN — BELGIO**



ADRESO DE LKK: Duisburgsestraat 12, B-3030 LEUVEN-Heverlee, Belgio. Tel. Belgio 016/20.14.53.

ADRESO DE TEJO: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando. Tel. Nederlando 010/36.15.39.

POR PAGOJ:
a. El eksterlando: petu informojn. (Nur) belgoj povas pagi en belgaj frankoj.
b. El Belgio: pagu al la bankkonto 734-3332670-50 de la 38a IJK 1982 - LEUVEN
Menciu "38a IJK 1982" kaj vian nomon.
c. Grava rimarko: Sendu la aliĝilon al la adreso de LKK (ĉi supre).

Mi aliĝas al la 38a IJK de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1982 laŭ kondiĉoj kaj prezoj presitaj sur la dorsa flanko.

Viro / Virino (*)
Kompleta nomo (preslitere):

Familia nomo (preslitere):

Kompleta poŝta adreso, nacilingva en latinaj literoj, kun poŝtkodo ĝuste lokita:

Lando (en Esperanto):

Naskiĝdato:

Profesio: Lingvo hejma

Vegetarano: jes - ne (*) **Subskribo:**

Dato de aliĝo:

Dato de pago:

Pagmaniero: (*) forstreku nevalida(j)n.

***Ne skribu ĉi sube!!!***
TEJO-membreco kotizo de ricevita por 19

Konfirmo de CO | Konfirmo de peranto:

Pago ne: / /198 | Statistikita / /198 | Dato alveno: / /198

Ankoraŭ pagenda:

Konfirmilo send. / /198 | 2a info. send. / /198 | Dato formo / /198

**Kongreskotizoj**, laŭ la dato de la PAGO, en belgaj frankoj

| Aĝo de la Kongresano je pagdato | ĝis 15/01/82 | ĝis 30/04/82 | ĝis 30/06/82 | post 1/07/82 |
|---|---|---|---|---|
| -20j | 3470 | Se vi aliĝas post la unua periodo, | | |
| 21j-25j | 3800 | demandu novan aliĝilon ĉe la LKK; | | |
| 26j-33j | 4460 | la kotizoj altiĝos <u>minimume</u> je 400 BF. | | |
| 34j- | 4960 | | | |

[ ] Mi pagas por partopreno en la tuta kongreso laŭ la ĉi-supra tabelo: + ..........

[ ] Mi estas malpli-ol-26jara individua membro de TEJO-UEA kaj rajtas rabaton de 490 BF − ..........

[ ] Mi volas 1-personan ĉambron (anstataŭ 2-personan) kaj pagas plian 420 BF + ..........

[ ] Mi volas littukojn (anstataŭ kunporti dormsakon) kaj pagas plian 160 BF + ..........

[ ] Mi nek loĝos, nek manĝos en la kongresejo kaj ricevos rabaton de 2.480 BF − ..........

[ ] Mi volas subteni la kongreson per aparta kontribuo: + ..........

Mi pagas sume: BF ..........

[ ] Mi estas pli aĝa ol 34 jaroj kaj devas do esti patrono de TEJO. Mi pagis/pagas al UEA/TEJO (dato ..............) per ............, aŭ pagos plej laste la unuan tagon de la kongreso.

[ ] Mi volas ion prezenti dum la internacia vespero (eventuale en grupo). Bonvolu iomete priskribi:

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

[ ] Aliaj rimarkoj:

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

— La kongreskotizo rajtigas loĝadon, manĝaĵojn (ambaŭ krom se ĉi-supre menciite), ekskurson kaj partoprenon en ĉiuj kongresaj aranĝoj — por la limdato de la aliĝo validas la dato de la ricevo de la pago — kongreskotizoj estas neniel repageblaj — aliĝilon nepre sendu al la adreso de LKK — en kazo de transpagaj obstakloj eblas konsulti la LKK — nur la kompleta kotizpago plene legitimas la aliĝon — pagante por alia persono indiku klare la celon de la pago kaj skribu detalan adreson de la persono por kiu vi pagas.

Kompostis kaj presis: Grafika Centro de UEA, Antverpeno
Esperanto 2000, Leuven



## ESTI FELIĈA. (Rik de Roover)

En iu numero de la revuo " AVENUE", mi legis ke ĉiu bone scias tion, kio estas la vivo, tiom longe ke oni pri ĝi ne babilaĉas. Nu, tiu eldiro certe ankaŭ valoras pri la feliĉo.

Fakte neniu, nek mi, nek vi, scias ekzakte tion, kio estas la feliĉo. Kiel pri ĉiuj esencaj elementoj de la vivo, - i.a. la vivo mem, la feliĉo, la amo, la morto - ni ne kapablas espr-imi tute adekvatajn opiniojn. Ĉio, kion ni kapablas fari, estas klopodi de el diversaj flankoj, alproksimiĝi kiel eble plej multe al la kerno de la problemo, ne malofte pere de komparoj el la ĉirkaŭanta vivo, sed la kernon mem, ni neniam kapablos kapti per ambaŭ manoj.

Sed tamen, ĉiuj ni alstrebas tiun re-esprimeblan feliĉon kaj estas komprenebIe ke la plimulto el ni opinias ke oni estus feliĉa, se oni kapablus nur akiri tion, kion oni deziras.

Jen, laŭ mi, la unua kaj fundamenta eraro. Certe oni havas la rajton strebi al pli da havaĵoj, pli da komforto, plani vojaĝojn ktp kaj tiu strebado mem kapablas eĉ pligrandigi onian feliĉon. Sed ekde la momento, ke tiuj alstrebitaj aĵoj iĝas prempensoj, oni estas ege malfeliĉa kaj oni trompas sin mem dufoje. Unue, ĉar tiom longe ke oni ne havas tion, kion oni deziras, oni estas malfeliĉa kaj due, ĉar mallonge post kiam oni tamen estas akirinta ĝin, oni spertas ke la feliĉo, kiun oni atendis estas malpli granda kaj malpli daŭra ol ni pensis.

Kaj tio estas tute logika, ĉar en sia postkuro de la feliĉo, la homo volas atingi horizonton, kiu - kiel faras ĉiu horizonto : la tero ja estas globo - forfuĝas same rapide, kiel oni alproksimiĝas al ĝi.

Tio estas la tragika grandeco de la homo. Li estas tro granda por povi esti materie daŭre kontentigebla.

Sankta Francisko de Sales diris : "Ho, mia animo, vi estas Di-kapabla, ve al vi, se vi kontentiĝas per malpli ol Dio." La nekredantoj inter vi anstataŭu la nomon de Dio, per ĉio plej nobla el sia konscio, kaj tiam ni certe povos akordiĝi.

Nur vivante, ne je la nivelo de la piedoj, nek de la sekso, nek de la stomako, nek de la ĉiam kaptemaj manoj, sed je la nivelo de sia animo, la homo kapablas trovi la feliĉon. Kaj por tia feliĉo, - la nura kiu indas tiun nomon -, belaj vojaĝoj, ardaj amspertoj, bonaj manĝaĵoj, belaj kaj komfortaj posedaĵoj, povas efiki kiel spicoj sur manĝaĵo, sed, se la manĝaĵo mem estas senvalora, la tuta ekzistanta spicaro ne kapablas valorigi ĝin.

Se oni ne kapablas starigi la feliĉon sur la pavimo, kie oni staras, oni ne sukcesos konstrui ĝin aliloke. La feliĉo estas nia, kiam la nadlo de nia interna baskulo staras vertikala. Kaj ĝi ĉiam vertikalas kiam je ambaŭ flankoj de la nadlo staras nek pesiloj, nek varoj. Tio estas la negativa, vivorifuza filozofio de la budhismo. Alstrebu la nirvanon, la neniiĝon de ĉiu pasio kaj de ĉiu deziro, kaj vi estos feliĉa. Kaj certe, tio estas vera. Sed iusence tia filozofio, kiu neas erojn el la homa naturo, kiel la pasioj kaj la deziroj, kiuj estas tiom esencaj, estas fuĝo el la vivo mem, mensa sinmortigo. Sed tamen ĝi povas instrui ion al ni, almenaŭ tion, ke se ni havas dezirojn, ni devas resti pli fortaj ol ili, ni devas regi super ili kaj ne imagi ke la plenumo de tiuj deziroj alportos de si mem aŭtomate la feliĉon. Male, se ni metas tiujn plenumitajn dezirojn, sen kontraŭpezo, en nur unu el ambaŭ telerojn de la baskulo, la ekvilibro estos neniigita, kaj sekve ankaŭ nia feliĉo. Por restarigi ĝin estos necese ankaŭ en la alian teleron meti ekvivalentan pezon. Nu, unu el tiuj teleroj estas la recipiento de niajn egoismoj, ni diru vertikalaj bezonoj. La alia tiu de la altruismaj, ni diru de la horizontalaj bezonoj.

Mi klarigu per ekzemplo. Mi deziras aĉeti aŭtomobilon. Mi aĉetas ĝin kaj metas ĝin en mian garaĝon. Jen mia aŭto ! Ĉu ĝi ne estas bela ? Estas mia aŭto, ne la via. Vertikala bezono.

Sed la aŭto ne restu en mia garaĝo. Mi konscias, ke ĝi ne estas celo en si mem. Ĝi estas nur ilo, rimedo por elradii, por viziti aliajn landojn, por iri al amikoj, por plifirmigi la rilatojn kun foraj parencoj, eĉ por helpi ilin. Ĉi ĉio alvenos en la duan teleron, tiu de la horizontalaj aplikoj. La ekvilibro estos restarigita kaj mi estas feliĉa. Ne estas malfacile trovi multajn aliajn ekzemplojn.

La objekto en si mem ne havigos al ni feliĉon. Ĉio dependas de la uzado, kiun oni faras de ĝi.

Multe da mono povas pligrandigi mian feliĉon, kondiĉe ke ĝi estu transformita en pozitivajn vivovalorojn. Sed ne ĉiuj pozitivaj vivovaloroj postulas multe da mono. Ne malofte ili estas modestaj, simplaj, senpretendaj kaj eĉ eternaj : la naturo, la sano , la suno, la lumo, la nokto, la akvo, la floroj, la silento, la bestoj, la sablo sur la strando, la bela muziko, via manpremo, via rideto, mia korpo, la brakoj de mia edzino ktp.

Sed tamen, perdo de la ekvilibro ne estas evitebla. Ni donu simplan ekzemplon. Mi vespermanĝas ĉiutage je la sesa. Estas la kvina kaj duono. Mi malsatas. Mia nutra stato estas do en malekvilibro. Ĉu mi estas malfeliĉa ? Ne, ĉar ju pli mi malsatas, des pli mi post duonhoro bonguste manĝos. En unu telero de



la baskulo troviĝas la malsato, sed ĝi estas jam antaŭ la manĝo denove metita en ekvilibron pro la antaŭvidita kontentiga manĝo. Tio, kio korpe vakas, estas psike plenigata. Same okazas pri multaj pli komplikitaj deziroj. Malekvilibro, ekvilibro daŭre alternas. Estas ade ondanta maro en nia animo, psika masaĝo kiu instigas la vivoguston kaj malebligas la animan rigidigon, kiun oni tro ofte rimarkas ĉe asketoj.

Sed ĉio ŝanĝiĝas se kontentigo de la deziro ne estas atingebla. Por la ĝenerala malriĉa hinda popolo neniel estas certe ke je la sesa ili kapablos satmanĝi kaj pro tio mi kredas, ke ĝia filozofio,kiu alstrebas neniigon de ĉiuj deziroj, ne hazarde regas ĉe ili.

Sed tamen, ankaŭ ĉe ni, kiuj kompare je ili estas riĉuloj, ne ĉiuj deziroj povas esti plenumataj. Se temas pri deziroj duarangaj, nia antaŭe klarigita sinteno, -ni diru okcidenta filozofio-, povas helpi nin. Male se temas pri vivonecesaj deziroj.

Nesanigeblaj malsanoj, daŭra kaj kruela sufero, la morto, akcidentoj, formorto de infanoj aŭ vivokunuloj, forbrulo de la domo ... eventoj kiuj daŭre minacas nin ĉiujn. En tiu senco eĉ la plej malgranda feliĉo pendas je silka fadeneto. Tiu, kiu estas feliĉa nun, povas esti duonhoron poste ege malfeliĉa. Tio metas nin antaŭ la grandan misteran problemon de la sufero. Kiel integrigi ĝin en nian vivon por povi pluvivadi feliĉa ?

Mi opinias ke tiujn aferojn oni devas ataki ne de el ekstere, sed de el interne. Multe dependas de nia mensa sinteno rilate ilin. Mi ĉiam estas ŝokita kiam mi aŭdas, - ne malofte eĉ t.n. kristanojn-, "mi ne meritis tiun malfeliĉon, mi faris ĉiam mian devon !" (Inter krampoj, kiu inter ni kuraĝus aserti tion la manon sur la koro ?) Kvazaŭ la malfeliĉo estus io, ĵetita de venĝema Dio, aŭ de stulta hazardo el iu fremda planedo, kiel ŝtono en ranmarĉon, meze en nian vivon.

La malŝanco estas same hejme en la homa vivo, kiel la feliĉo. Ĝi ne estas fremdulo. Ĝi ne estas negativa kliŝo, kiu en la mano de bona fotografo, povas iĝi bela foto. Al la kredantoj inter ni, mi diru ke ili donu la kliŝon al tiu bona fotografo, kies nomon ili konas : Dio !

La malfeliĉo estas ŝtoneto kiu, per iu hazardo, -ĉu hazardo ekzistas ?-, venis en la konkon de molusko kaj la molusko envolvis ĝin per sia perlamoto kaj finfine estiĝis bela perlo.

Io simila povas okazi ĉe ni, se ni kuraĝe kaj kun fido, ne nur de ekstere, sed precipe de interne atakas ĝin. La malfeliĉo estas instigo por ni, por pripensi, primediti, por internigi nian vivon, kiu eble tro ofte moviĝis nur je la surfaco, por lerni distingi en nia vivo la vere valorplenajn aĵojn de la senvaloraj aĵoj.

Se ni tiele atakas la malfeliĉon, ni eble spertos je iu momento, ke ni ne batalas kun diablo, sed kiel Jakobo en la Biblio, kun anĝelo, kiu finfine benos nin.

En la sama Biblio staras bela rakonto pri virino kiu estas naskonta infanon. Ŝi ploras kaj veas, sed ekde la momento ke naskiĝis la infano, ŝi ĝojas kaj estas feliĉa. Ĉar venis nova homo en la mondon.

Musoj kaj insektoj naskiĝas sen penoj, sed homoj kaj ĉio kiu estas valora kaj estas granda naskiĝas en doloro. Mi kredas ke tio estas la profunda senco de la sufero en la mondo kaj ankaŭ en nia propra vivo.

Ĉio havas signifon ankaŭ la doloro. Foje ni kredas kompreni tiun sencon, foje ni nur komprenas ĝin jarojn poste, foje eĉ ne. Ĉu bebo komprenas kial ni rifuzas al ĝi trančilon ?

Same mi kredas ke ankaŭ la doloro, kiun ni ne komprenas, ne estas ŝtelisto kiu kiel fremdulo venis en nian domon, sed naskodoloro por krei novan "nin mem", same kiel en la molusko naskiĝis multvalora perlo.

Kaj ĉiuj ni havis jam la okazon almozpeti je la riĉa trezoro, kiun personoj kiuj multe suferis en sia vivo, ne malofte portas en la animo, per kiu ili ne malofte kapablas konsoli la aliajn. Ilia feliĉo similas al pentraĵo de Rembrandt. Multe da mallumo, sed, el iu kaŝita fonto tamen, iu mistera lumo ĵetiĝas sur la ĉefajn figurojn.

Esti feliĉa, tio signifas neniam plori nek vei, neniam plendi kaj severmieni. Esti feliĉa, tio signifas, je la fino de la tago aŭ de la monato aŭ de la jaro, eble eĉ de sia vivo, povi danki tiun, kiu donis ĝin al ni.

Sed tiam oni devas havi la kuraĝon de la vivo, la kuraĝon mem pripensi ĝiajn motivojn. La kuraĝon vivi, anstataŭ esti vivata, puŝata de antaŭfabrikitaj ideoj, normoj, idealoj. Kaj tiam oni foje iĝas kuriozaĵo en la okuloj de la aliaj, kvankam oni neniam alstrebis tion. Tiam povas okazi, ke iu povas esti samtempe katoliko, politika maldekstrulo, porulo de la kremacio, naturisto kaj esperantisto.

10 06 1976.

---



## SKRAĈ

Kun bruniĝinta kapo ili sidis denove sur sia kutima loko ĉe Ludovik' antaŭ la bufedo kaj iliaj genuoj denove fidele karesis la verdan felton. Bedaŭrinde ke ili ne povis montri ilin ĉi tie aŭ sia dorso, ĉar ankaŭ tiu ĉi estis ege brulstampita de la suno.

Sur la bufed-ŝranko pendis la bildkartojn kiujn ili estis sendintaj kun la taŭro de Torremolinos kaj "Grüsse aus demSchwarzwald" (salutoj el la Nigra Arbarego) kaj kun la nokt-kluboj de Salou. La lastaj bril-skvamoj de pasintaj ferioj...

" Plaĝo kiel mondo havis ni", diris la ulo de Lido de Jesolo.

" Kaj varme estis ! Terure !".. diris Salou. Li malbutonumis sian ĉemizon kaj montris parton de sia brusto. Tutaj platoj da bruligita haŭto estis malligiĝintaj. Estinta raŭpo li estis kaj nun elkokoniĝis bela, bruna papilio.

" Plaĝo plena de nudistoj", diris Dubrovnik sensume. Apenaŭ estis li malkovrinta tiun ĉi kampadejon, ke Tanger supertondris ĝin per plena haremo, sultano, eŭnukoj kaj uzadinstrukcio de iu tia harembelulino inkluzive. Ekestis procesio de ekzotismo.

Malantaŭ sia bufedo, Ludovik' instigis aŭ bremsis laŭ la direkto kiun prenis la konversacio.

" En Bulgario ofte pluvis .." parolis Burgas tra-intere. Li sidis tie sur sia taburo inter Viareggia kaj la Kanariaj Insuloj, videble premata sub la perturboj de Balkano kaj la ciklono el la Nigra Maro.

" Ja ne plaŭdpluvegis, sed tamen daŭre pisumadis .." diris li. Dum li tusliberigis sian gorĝon, la ajlo kiujn li antaŭ du tagoj estis kaŝ-transportintatra diversaj lim-stacioj, energie drivis elen. Hispanio oni estis malkonsilinta al li, ĉar tie estas tro da oleo en la manĝo kaj Tirolo, ĉar tie la noktoj estas tro fridaj. Li estis unu el tiuj homoj, kiuj ĉiam trovas muŝon en sia supo kaj kiuj en la necesejo regule estas sen papero ...

Ankaŭ ekzotismo tie ne estis. De temp'al tempo li renkontis fortikan kampulinon kiu revenis de la fojnado. Li tamen estis tiom penante ion sukcesi! Ĉe Dimitrov li ja jam estis foje. La biero ne estis malbona. Ne, tion li ne povis diri. Kaj dimanĉe tiuj maljunaj Bulgaroj promenis en ruĝa kamizolo kaj, laciĝinte, sidis hejme en la subtegmentejo, suĉante grandan pipon.

Lia piedo serĉis apogon sur la ligstango de sia taburo pro kio, inter krur-ingo kaj ŝtrumpo, videbliĝis triste-blanka kruro. Jen klarvide homo, kiu havis nenion por kaŝi.

Kiam ili silentis, Ludovik' malantaŭ la bierkrano, faris ion kiel pastro, per skermantaj manoj.

Tiel kun plena pindo antaŭ si, ili ĉiuj denove estis samaj. Ĉiuj denove "skraĉe" startis novan, proletaran jaron.

La vivo estas justa.

El "Van de Pot op de Pint"
"De la poto al la Pindo" de
Jan TOONEN.
Tradukis Johan Superter'.

---

## POPOLOJ, INTERKONATIĜU PER ESPERANTO (F. ROOSE)

IOM DA HISTORIO.

### ANTVERPENO EN LA 16-A KAJ 17-A JARCENTOJ

Dum la tuta moderna historio, Antverpeno estis la urbo kiu nerezisteble altiris la kuraĝeman kaj scipovan homon. Pli ol unufoje la urbo estis ja supro, lumilo en la ĝenerala homa civilizacio.

La unua kaŭzo sendube estis la natura, geografia lokiĝo mem ; ĝi estis kaj ankoraŭ ĉiam estas la loko de kruciĝo de la grandaj internaciaj vojoj, akvaj kaj teraj, inter la Eŭropaj kulturlandoj.

La granda rolo, kiun ĝi ludis en la sociekonomia historio datumas el la 16-a jarcento. Ĝi estis tiam la ĉefa komerca centro de Eŭropo. Tiun grandecon ĝi dankis, post sia favora lokiĝo, al la komerclibero kiu estis de la komenco la bazo de ĝia politiko. Krom tio aldonu la transmetiĝon de la pe[illegible] centro de la transmara komerco, antaŭe en la havenoj de la Meza Maro, nun al tiuj de la Atlantika Oceano, sekvo de transmaraj malkovroj de Hispanoj kaj Portugaloj. Ameriko kaj Hindujo havis nun kiel komunan vendejegon Antverpenon. Vastaj konstruajoj estis metataj je la dispono de komercistoj en la Hoboken- kaj Venusstratoj, la fama Domo de l' Orientanoj, la riĉa Domo de Portugalujo en Kipdorp. Reĝaj faktoroj traktadis gravajn depruntojn por siaj reĝoj : Schetz kaj Lopez Gallo por la Hispana, Thomas Gresham por la reĝino de Anglujo. Regionoj kiuj pli malpli estis defal_intaj, kiel Okcidenta Flandrujo kaj Henegovio, dankis sian relativan reviglîĝon al Antverpeno. La Genta industrio restis grava por la disvolviĝo de la Skeldo-urbo kaj la art-tapet-industrio de Aŭdenardo, Bruselo, Meĥleno eĉ ne povis liveri ĉiujn demanditajn produktojn.



La sprita vivo de la Skeldurbo radiis al la deksep Nederlandaj provincoj, de kiuj ĝi estis kvazaŭ la ĉefurbo. Nenie la presarto floradis kiel tie ĉi, kun la reĝaj presistoj kiel Plantin kaj Silvius. Abraham Verhoeven publikigis tie ĉi la unuan regulan gazeton. En la servo de komerco kaj scienco Ortelius aperigis sian unuan faman atlason "Sceno de la Tero" en 1571. Urbo de lukso kaj de riĉego ĝia fabrikado de silkaj ŝtofoj estis unika. La diamantindustrio fakte naskiĝis tie ĉi. La kompleksaj monvalorajoj, kiuj alfluegis tien ĉi el ĉiuj landoj, okazigis reformon de la kambio-sistemo : grandaj spekulacioj okazis dum la kvar foiroj. Je unua fojo la komerco estis science organizata, dank'al nova severa, logika librotenado, pri kiu la unua Flandra kompendio de Ympijn aperis en 1543. La Antverpena kutim-leĝo pri asekuro estis la ekzemplo por aliaj popoloj.

Du belegaj gravurajoj memorigas nin pri la du ekstremaj datoj, inter kiuj la triumfo de Antverpeno troviĝas : la unua estas la preĝeja turo, la alia, pli gracia kupra gravurajo de Vrients el 1610. Sur ambaŭ multege da turoj kaj altaj fasadoj. La Flandra Renesanca konstrustilo nakis sian novan urbodomon, sian domon de Orientanoj, sian Borson kaj Gildodomojn. Granda vico da artpentristoj, de Quinten Metsijs ĝis Rubens kaj Quellin liveris pentrajojn al la tuta konata mondo. Iu Frans Floris havis centdudek lernantojn kiuj pentris milojn da pentrajoj, nur por eksporto. Sur literatura kampo sin distingis pioniroj kiel Anna Bijns, Marnix de Aldegonde, junkro Jan van der Noot.

... sed poste komenciĝis la disfalo pro militoj kaj religiaj bataladoj. ANtverpeno estis ankaŭ la unua urbo kie falis la unuaj viktimoj de la Reformacio kaj ĝi estis la urbo de Hispana furio. Multaj unuarangaj elementoj elmigris kaj ... kunlaboris al la progresego de "Holando". Ĝis post la mezo de la 17-a jarcento, Antverpeno restis unu el la plej allogaj urboj, sed ne plu estis la bruega renkontejo de la internacia mon- kaj marvetur-kome_rco. Ekestis enprofundiĝo, kvieteco.

Ĉi tio estis kelkaj observoj pri la 16-jarcenta Antverpeno kiam ĝi estis vere unua faktoro en la estiĝo de la moderna Eŭropo.

Jen, por ilustri la tekston, kelkaj ciferoj kaj nomoj.

En 1568 Antverpeno havis ĉirkaŭ centmil loĝantojn ; Amsterdam 80-mil. En 1648 Antverpeno havis ankoraŭ 55-mil enloĝantoj ; Amsterdam 160-mil !

La elmigrintoj estis pleparte entreprenemaj kaj kapablaj personoj. Jenaj ANtverpenanoj elmigris i.a. al la Nordo kaj ekhavis jenajn okupojn aŭ postenojn Peter Vanden Broucke iĝis direktoro de la komercrilatoj kun Hindujo. Samuel Bloemaert ĉefkomisaro de insulo Soekadam. Joris van Silbergen guberniestro de la Molukaj insuloj. Willem Usselinx fondinto de la "Okcident-Hindia Komerckompanio".

GRUP-ESTROJ/SEKRETARIOJ Bonvole resendu jenan formularon plenigita antaŭ 31 01 1982

---

Grupo ______________________

Korespondadreso ______________________

______________________

Prezidanto ______________________

______________________

______________________ Tel.: __________

Sekretario ______________________

______________________

______________________ Tel.: __________

Kasisto ______________________

______________________

______________________

Kont-numero ______________ Tel.: __________

Reprezentanto en la administrantaro de FEL

( 1 (unu) el ĉiu 50-o da membroj je 31 12 1981)

______________________

______________________

______________________ Tel.: __________

Ĉu en via grupo estas persono kiun vi konsideras kapabla kaj kiu konsentus partopreni la estraron de FEL ?

Kiu ? ______________________

______________________

______________________ Tel.: __________

Via kandidat-prezidanto de FEL

( ne necese el via grupo ) ______________________

---

Bonvole ĉiukaze resendi tiun ĉi formularon, eĉ se vi havas nenion por enmeti.

Dankon.

Ĝenerale oni konsideras la jaron 1585 kiel turnpunkton de la prospero al la malprospero de Antverpeno. En tiu jaro Aleksandro Farnese sukcesis akapari Antverpenon, per kiu fakto estiĝis la separo de la Nordaj disde la Sudaj Nederlandoj. Kaj per tiu fakto ni plu restis sub fremdaj okupadoj, dum la Nordanoj iĝis sendependaj. La posta jarcento estis ilia "ora jarcento" kaj la nia la "malfeliĉa jarcento". Oni tamen ne sufiĉe atentas pri alia tre grava malsukceso. En 1632 okazis intertraktadoj inter la sendependa Norda Respubliko kaj Francujo por dividi la Sudajn Nederlandojn. La grafoj de Warfuzée kaj VandenBerg proponis dividi tiun teritorion laŭlonge de la lingvolimo, tiel ke la nederlandlingva parto venus ĉe la Nordo kaj la franclingva parto ĉe Francujo. Ege malfaliĉe tiuj traktadoj malsukcesis. Unuflanke Francujo volis multe pli, i.a. grandan parton de la nederlandlingva parto. Aliflanke Norda Nederlando timis havi je siaj landlimoj la rapide fortiĝantan Francujon kaj ankaŭ malŝatis la denove Romkatolikan Sudon.

---

## EL LA PROVERBARO

| | |
|---|---|
| Neleĝe akirita ne estas profita. | Gestolen goed gedijdt niet. |
| Servo postulas reservon. | De ene dienst is de andere waard. |
| Ŝteliston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas. | Kleine dieven hangt men, grote dieven laat men lopen. |
| Rostita kolombeto ne flugas al buŝo. | De gebraden duifjes vliegen je niet in de mond. |
| Vortoj sakon ne plenigas. | Praatjes vullen geen gaatjes. |
| Komenco aprila, trompo facila. | In april stuurt men de gekken waar men wil. |
| Lernu juna, vi scios maljuna. | Jong geleerd is oud gedaan. |
| Post sufero venas prospero. | Na lijden komt verblijden. |
| Ne povas ĉiu homo esti Pap' el Romo. | Er is slechts één grote mast op een schip. |
| Kia ago, tia pago. | Zo men doet, zo men ontmoet. |

---

## KIU SCIIS ?

La "mistera" teksto el la antaŭa numero estis :

LA MEZEPOKA ESPERANTO

el

LINGVO, STILO, FORMO de K. KALOCSAY.

---